

AŬTUNO 2001

SVENSKA
ESPERANTO-
TIDNINGEN

La Espero

2001:3-4

Informado al lernejoj



Preta por akcepti la unuajn vizitantojn

Redaktion:

Jan Setréus

Frågor om prenumeration o. dyl.:

Esperanto-Centro, Vikingagatan 24,
113 42 Stockholm, tel. 08-34 08 00E-post: espero@esperanto.se

Ansvarig utgivare: Leif Nordenstorm

Utformning: Omnibus Typografi, Tyresö

Tryck: HA Reklamtryck, Stockholm

Prenumeration 2001: 200 kr.

Prenumerationsavgift för *La Espero* ingår i medlemsavgiften. Postgiro 20 12-3, Esperantoförbundet.

ESPERANTOFÖRBUNDET

Adress: Esperanto-Centro,
Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm,
tel. 08-34 08 00E-post: sef@esperanto.seNätsida: www.esperanto.seÖppettider: Esperanto-Centro har flexibla öppettider
dagtid. Ring i förväg!

Postgiro: 20 12-3, Esperantoförbundet

Medlemsavgift 2001:

Direktansluten medlem 200 kr.
Ungdomsmedlem (max 20 år) 100 kr. Medlemmar under 30 år är samtidigt medlemmar i SEJU, Sveriges Esperantisters Ungdomsförbund.
Hel familj 300 kr (inklusive ett exemplar av *La Espero*.
Tilläggs exemplar kostar 100 kr/år).

ESPERANTOFÖRLAGET

Adress: Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm

Telefon: 08 - 34 08 00

Fax: 08 - 34 08 10

Postgiro: 578-5

Nätsida: www.esperanto.se/eldonaTelefontid: Samma som Esperanto-Centro Stockholm.
Skriftliga beställningar expedieras under hela året.

Styrelsens ordförande: Ole Hansen

Ny redaktör fr. o. m. 1 januari 2001!

Manus till *La Espero*sänds till Leif Nordenstorm
Järnvägsgränd 11
961 76 Boden
tel. 0921-123 54
e-post: nordenstorm@hem.utfors.se

Lingvoj en Västerås

Ĝi okazis la 20an de oktobro en la nova Kulturcentro *CULTUREN* de Västerås. La festivalejo estas iama fabrikkalego kie multe povas okazi samtempe. Ni disponis pri tri ĉambregojn kaj la spacon inter tiuj kaj la restoracio.

En du tiaj ĉambroj okazis samtempe interesaj prelegoj, i.a. pri la stranga sveda lingvo, pri la gesta lingvo, pri kinezio (la korpa lingvo) kaj diskutoj en la Filozofia kafeo. Tio ne samtempe, sed dum kvar tempoj en la prelegĉambro.

Aktivecoj por la infanoj okazis en la "fabelĉambro". Temis pri kantado, legado de iranaj fabeloj en la sveda, kaj teatro de marionetoj.

La partoprenintoj havis eblecon aŭskulti prelegon, ĉeesti infanaktivecon, aŭ viziti iun prezentadon de lingvo en la plej granda ĉambro.

Kvarfoje dum la posttagmezo kolektiĝis lingvaj ambasadoroj de malsamaj lingvoj malantaŭ tablo kiel dum merkato, kie ili ekspoziciis librojn, objektojn ktp. Ili ankaŭ havis eblecon skribi sur grandaj folioj por eta leciono dum ili klarigis al preterpasantoj sian lingvon.

Tridekunu lingvoj estis prezentitaj. Kelkaj lingvaj ambasadoroj estis kontentaj pri la vizitintoj al siaj budoj. Kelkaj tute ne havis vizitantojn.

La esperanta budo ricevis 1 intereseon, kiu eble en la plej proksima estonto havos iun signifon por nia movado.

La prezentitaj lingvoj estis: araba, aimara, dana, esperanta*, finna, franca, hinda, japana*, jida, kreolingvaj, kroata*, kurda, latva, litova, nederlanda*, persa, piĝinaj lingvoj, pola, romana, rumana, rusa, lapona, serba, slovena*, hispana, somala, svahila, tigrinja, ukraina, hungara kaj keĉua ')).

* Ses samideanoj estis ambasadoroj.

La festivalo estis inaŭgurita de la ABF koruso *Stämning*, iama polica serĝento kaj Svedo de la jaro, Sten Axelsson kaj la prezidantino de la Kultura Komisiono de Västerås, Marita Öberg-Molin. De tiu komisiono la festivalo ricevis 50 000 kronojn. La ceterajn kostojn pagis ABF, kaj la kulturorganizo "FolkeNs Park".

Dum la festivalo troviĝis kelkaj ekspozicioj kaj librotabloj, kie lokaj verkistoj havis eblecon vendi siajn librojn.

Katja Ignatijeva, kiu nun loĝas en Västerås, faris fotoekspozicion pri la festivalo en Ĥeboksari. La cicerono dank'al tio dum la inaŭguro rakontis i.a. ke dum la sama semajnfino okazas tri aliaj lingvaj festivaloj en Eŭropo. Mi faris ekspozicion pri esperanto.

Aliaj temis pri Aimara kaj la keĉua, disleksio kaj la Centro de dulingveco (multaj instruistoj instruas sian gepatran lingvon. Kelkaj el ili estis ambasadoroj dum la festivalo)

Dum la vespero okazis bunta kultura programo kaj tre abunda bufedo por ĉiuj gustoj. Ĝi estis senpaga por la kunlaborantoj.

Diversaj kulturoj estis reprezentitaj kiel la afrika kun siaj ritmoj, Sudameriko (Bolivio kaj infandancoj), junularakrobatarto ("breakdance"), unu tradicia virina dancado de Irano kaj Diverslingve (Nataša kaj Andreo Bertse). Ili kantis en diversaj lingvoj kaj kompreneble kelkfoje en esperanto. Dank'al tiu koncerto kaj la interparoloj de Nataša esperanto denove aktualiĝis. La duo Diverslingve nepre estas grava parto de kulturprogramo dum lingva festivalo. Sen ili esperanto tute dronas en la amaso.

Dum la vespero vizitis nin S:ro Venskyte, samideano de Kaunas.

Li estas la patro de Diana, ambasadorino de la litova lingvo. Dum tiu tempo li vizitis la filinon. Ankaŭ estis ĝojige, ke aliaj samideanoj restis dum la vespero kiel Bengt, Helena, Franko, Gudrun, Sjoerd kaj Katja.

Kio poste? Ni (mi) ankoraŭ ne decidis aranĝi la trian festivalon, ŝajnas ke ABF ankaŭ hezitas.

Esperanto nun estas konata fenomeno en la Centro de dulingveco. Ni eĉ estis invititaj inaŭguri serion da lingvaj kaj kulturaj prezentadoj ĉi aŭtune, la 5-an de septembro.

En la loka kablotelevido *Öppen Kanal* nun estas montrataj filmoj pri la festivalo. Je la fino de tiuj filmoj ĉiam estas menciite, ke ABF kaj la Esperantoklubo estis la organizintoj de la koncerna Lingva Festivalo.

Katja malgranda faris belan hejmpaĝon (www.welcome.to/sprakfestival) en kiu aperas fotoj. Eblas ankaŭ aŭskulti (esperantan) muzikon.

Wim Posthuma

Trofeo Fyne al Svedio!

La ĉi jara kongreso de UEA en Zagrebo finiĝis sabate la 28-an de julio. Dum la ferma ceremonio okazas diversaj prelegoj kaj superrigardaj prezentoj pri la plej rememorindaj okazintaĵoj inter la multaj eroj de la programaro.

Surpodie sidis la nova estraro, kaj la nova prezidanto Renato Corsetti el Italio gvidis la kunsidon. Li jam estis estrarano dum kelkaj periodoj, sed neniam antaŭe prezidanto. Prezidanteo ne estis lia deziro, sed neniu alia inter pridemanditaj eblaj kandidatoj akceptis kandidatecon. Renato Corsetti tamen ricevis du apogulojn — du eksajn prezidantojn — Lee Chong-Yeong kaj Humphrey Tonkin. Nova ĝenerala sekretario estas nun Ivo Osibov, profesoro el Kroatio. Aliaj novaj estas Ans Bakker-ten Hagen el Nederlando kaj juna rusa Andrej Grigorjevskij. Restas en la estraro Michela Lipari kaj Gbeglo Koffi.

La nova estraro havas 8 anojn.

La ĝenerala direktoro de UEA, Osmo Buller informis ke li venontjare forlasos sian postenon en Rotterdam. Li laboris tie dum 17 jaroj kaj nun pro diversaj kaŭzoj ne plu volas resti.

Surpriza premio al SEF

UEA ĉiun duan jaron nomumas landan asocion por Trofeo Fyne kaj estrarano Lipari deklaris ke la ĉijara ricevonto estas Sveda Esperanto-Fede-



racio! Kio??? Lipari petis la prezidanton (?) de SEF, Roland Lindblom veni al la podio por simbole akcepti la trofeon.

La trofeo trovigas ĉe UEA en Rotterdam. Kiel simbolo mi, eksa prezidanto, ricevis survangan kison. En tiu momento mi ankoraŭ ne komprenis, kial nia asocio estis nomumita. Ĉu iu erare kalkulis? Miaj vortoj en la mikrofonon certe montris, ke tie staras konfuzita viro ...

La kondiĉo por ricevi la trofeon estas notita en la jarlibro de UEA. "... en kies lando okazis la plej granda proporcia kresko de la nombro de individuaj membroj de UEA dum la du antaŭaj jaroj". Poste venas aldono: "... aŭ kiu alimaniere grave kontribuis al la plifortigo de UEA".

Paŭzo en la kunsidoj. Videblas sur la bildo la prezidanto de la Akademio de Esperanto, Geraldo Mattos (meze, kun okulvitroj) kaj ĝia vicprezidanto Christer Kiselman (maldekstre)

Trovigas nun 63 landaj asocioj en UEA. La asocio en la afrika lando Benin, ĉi-kongrese estis akceptita kiel la 63-a membroasocio.

Mi havas jam de multaj jaroj fortan opinion, ke UEA bezonas multajn individuajn membrojn por vere montri, ke la esperantomovado estas internacia. Svedio ricevis kiel unua lando la trofeon en 1975. Helpu nin regajni la trofeon post du jaroj en la Universala Kongreso en Göteborg 2003!

Roland Lindblom

Ekster la kongresejo, atendante la alvenon de la prezidanto de Kroatio



*Kun sincera
pardonpeto pro la
malfruiĝo de ĉi tiu
numero kaj elkoraj
bondeziroj por la
proksimaj festotagoj!*

La estraro de SEF

PS. Preskaŭ samtempe atingos vin pliaj 24 paĝoj, du tutaj numeroj en unu kajero, kun multaj pensigaj kaj distrigaj legajoj.

Impresoj kaj spertoj

Fine de oktobro SEJU kaj TEJO organizis en Upsalo seminarion pri uzado de esperanto en la interreto, nomita e@i. Krom tio, ke ĝi ebligis al grupo da junaj homoj multon novan lerni, ĝi rezultigis bonegan artikolon en la ĵurnalo Dagens Nyheter.

La artikolo estis ankaŭ legebla en la interreta eldono – kaj oni povis eĉ legi ĝin en esperanta traduko – kun ĉiuj supersignoj perfekte kuŝantaj super la specialaj esperanto-literoj!

La artikolon akompanis mallonga videokurso pri esperanto, ankaŭ interrete.

Pri la seminario skribis ankaŭ Upsala Nya Tidning kaj oni povis aŭskulti intervjuojn kun la organizantoj kaj en la loka kaj tutlanda radio-programoj.

Partoprenantoj de e@i dum ekskurso al Stokholmo, ĉi tie antaŭ la parlamentejo.

La 27-an de oktobro 2001 mi allugis al Stokholmo-Arlanda ("mi" – 21 jara rusino). Tiutage en Svedio, Uppsala, komenciĝis TEJO-seminario: Esperanto ĉe Interreto (mallongigo: E@I). Dum la sekvaj sep tagoj mi apenaŭ dormis kaj multege lernis, foje amuziĝis kaj eĉ sukcesis iom rigardi Svedion, kiun mi vizitis la unuan fojon. Ĝuste pri tiu semajno mi rakontas en la artikolo.

Unue iom da statistiko: la seminario okazis jam la duan fojon. Partoprenis ĉirkaŭ 30 esperantistoj el 17 landoj. La nombro de inoj kaj malinoj estis preskaŭ egala (kio raras por "komputilaj" aranĝoj, ĉu ne?) La temo de la ĉijara seminario: Rete kunlabori.

Dum la semajno ni lernis diversajn aferojn. Eblis elekti unu el du paralelaj kursoj. Mi, kiel "ret-komencanto", lernis HTML, kaj diversspecajn babilprogramojn, iom pri aspektigado de la retpaĝoj kaj simile. "Spertuloj" povis ĉeesti lekcionojn pri Java kaj PHP kaj JSP. Paralele ĉiuj laboris en laborgrupoj, pridiskutis projektojn, pri kiuj ili interesiĝas.

Krom lerniga programo por amuzaj restis nur vesperoj kaj paŭzoj, kiujn ni aktive uzis. Interkona vespero, maloscedigaj ludoj, sportumado, vesperaj ludoj, du koncertoj, internacia vespero, vortar-ludo – ŝajne mi nenion forgesis.

Por rakonti pri ĉio ne sufiĉos spaco ĉi tie, do mi elektis nur unu programeron por pli detala rakonto: Internacia vespero.

Ekzistas jam delonge tradicioj kiujn oni sekvu dum esperanto-aranĝoj, evidente ankaŭ por "Internaciaj vesperoj" ekzistas tiuj. Ĉefa ideo de la vespero: doni eblecon al ĉiuj partoprenantoj prezenti sin kaj propran landon al ĉiuj aliaj.

"Internacia vespero" dum la lasta punkto de la seminario sekvis la saman ideon, sed komenciĝis vere originale. Ni – partoprenantoj – komparis sonojn de diversaj bestoj: kiel ilin prononcas homoj en diversaj nacilingvoj. Ridinde ni konstatis, ke bovinoj, hundoj, kokinoj, kat/id/oj ankaŭ "parolas" diversajn lingvojn.

Poste sekvis alia amuzajo: "imitu akcenton". La partoprenantoj legis la samajn frazojn pri celoj de la seminario imitante diversajn akcentojn. Multaj sonis tre simile al naciaj elparolmanieroj, kelkaj – ne tiom.

La manĝebla parto de la vespero estis tre varia, ĉefe dolĉaĵoj sed ankaŭ kelkaj strangaj (por mi – rusino) ekzemploj de naci-gust-preferoj. Bedaŭrinde gustumi alkoholaĵojn ne permesis la reguloj de la ejo, sed fiŝoleon ja povintus gustumi ĉiu deziranto.

Diversmaniere estis prezentita ĉiu lando, kies partoprenantoj ĉeestis E@I. Ĉiuj instruis salut- kaj ĝisvortojn el propra lingvo/dialekto. Kelkaj limigis landprezenton al reklamo de la nacia manĝaĵo (mi miris, kiel ili sukcesis ne formangi ĉion tiel bongustan ĝis la lasta vespero :-), multaj belege kantis en propraj lingvoj. Svedan "orkestron de modernaj muzikinstrumentoj" (temis pri "orkestro de

poŝtelefonoj) malgraŭ bona prepariĝo ni bedaŭrinde ne aŭskultis pro iuj teknikaj kialoj.

La oficiale organizita parto de la vespero finiĝis per komuna kantado de la kanto "Vivu la stel' ". Memkompreneble, vespero daŭriĝis en la manĝejo, kie lacaj retumantoj kantis, babilis, trinkis kaj gustumis manĝaĵojn el diversaj landoj. Paralele por dancemuloj funkciis diskoteko kun diversspecca muziko.

Ŝajne ĉio finiĝis nur matene, sed, verdire, "je kioma?" – por mi, estas malfacila demando.

Inter komputilaj kaj amuzaj programeroj ni eĉ sukcesis iom rigardi Svedion. "Gvidado tra Uppsala" – ekskurso de Torun aparte plaĉis al mi. La ekskurso al Stokholmo estis iom malseka, certe neniu kulpas, ke pluvegis precize tiutage kaj ŝajne por ĉiam la ĉefurbo de Svedio restos en mia memoro kiel urbo de belaj konstruaĵoj, muzeoj, bongusta glaciaĵo kaj pluvo.

La ĉefaj celoj – instrui bazajn aferojn por "ret-komencantoj", pli specialajn por "spertuloj" kaj fondi teamojn por estontaj ttt-projektoj – estis plene realigitaj, dank' al la organiza teamo, prelegantoj, helpantoj.

Mi ĝuis tiun semajnon kaj vere akiris multajn sciojn kaj spertojn. Estas tre utile havi tiun seminarion por instigi plie labori kaj studi, trovi kaj kunigi homojn pretajn kunlabori.

La plej forta impresio tamen ne rilatas al seminario – sed al saĝa sveda leĝo kiu protektas sanon de gejunuloj. Kion mi celas? – En Rusio oni povas aĉeti cigaretojn ekde la 16-a jaraĝo, jen...

Se vi volas pliajn informojn pri Esperanto@Interreto ĝenerale kaj pri la pasinta aparte, mi rekomendas la retpaĝon www.ikso.net/echei. Tie troviĝas informoj pri ĉiu partopreninto kaj apartaj programeroj, plus fotoj, amuzaj komentoj, rezultoj de evaluado ktp.

Julinka Litvinova
(Rusio, Tihvin)

skribu: litvin@karelia.ru
babilu: <http://lendar.karelia.ru/chat/>



La pra- kaj mezhindaj lingvoj

Same kiel ne ĉiuj lingvoj de Nordio estas nomataj nordiaj, ne ĉiuj lingvoj de Hindio estas (laŭ lingvistika terminologio) hindaj aŭ, pli precize, hindaraj. Kaj la nordiaj kaj la hindaraj lingvoj apartenas al la lingvofamilio hindeŭropa, sed en ambaŭ regionoj estas parolataj ankaŭ aliaj lingvoj - en Nordio finn-ugraj, en Hindio precipe dravidaj sed ankaŭ alifamiliaj.

Por eviti miskomprenon: kiam mi skribas "Hindio", mi celas la tutan sudazian regionon, ne nur la nunan respublikon, kies limoj estas nek lingvaj nek kulturaj.

Foje la hindeŭropaj lingvoj estas nomataj, aŭ almenaŭ nomitaj, ankaŭ hindegermanaj; kvankam al ili apartenas ankaŭ la lingvoj keltaj, latinidaj, slavaj, baltaj, greka kaj iranaj, ĝuste inter la lingvogrupoj germana kaj hindarja videblas apartaj paraleloj. Tio videblas ekzemple en la nomo de la tondrodio (nomon kiun ni trovas ankaŭ en la esperanta vorto "tondro"): svede Tor, pranorvege/praislande Thórr, pra-anglosakse/Thunor, pragermane Donar, kaj sanskrite Indra. Aliflanke la plej simila dio en la greka religio nomiĝas Zeus, kaj latine Iovus aŭ Iuppiter, el tute alia radiko (tamen etimologie identa al la veda ĉielodio Dyauh).

La prahinda latino

Nun mi menciis du terminojn rilatajn al la prahinda lingvaro: veda kaj sanskrita. PIV asertas ke sanskrito estas la plej malnova konata membro de la hind-eŭropa lingvofamilio, sed inter hindologoj tiu opinio estis eksmoda jam kiam PIV eldoniĝis, parte ĉar la hitita estas fakte eĉ pli malnova (kaj pri tiu, PIV skribas ke "la hitita lingvo estas hind-eŭropa), kaj parte ĉar oni nuntempe emas rigardi la vedan kaj la sanskritan kiel du apartajn lingvojn.

Laŭ tiu vidpunkto, la veda lingvo - do la lingvo de la kvar vedoj - estas verŝajne tre simila al la prahinda lingvo iam fakte parolata de la popolo, sed la sanskrita tiu prahinda uzata de kleruloj, kiam la popolo jam parolis mezhinde, aŭ prakrite. En Eŭropo, ni havis iom similan situacion dum la mezepoko, kiam ĉiuj eŭropaj kleruloj komunikadis inter si en la latina, dum la ordinaraĵoj homoj en la sudokcidenta Eŭropo parolis lingvojn latinidajn, ne plu latinajn.

Tamen estas grava diferenco: en la historio de la latina literaturo, la antikveco estas ĝenerale rigardata kiel multe pli grava ol la mezepoko (la sveda latinlingva verkisto Petrus de Dacia estas pli respektata kiel la unua konata verkisto de Svedio ol kiel verkisto de la latina lingvo, kiun li laŭdire skribis mizere); sed la oraj jaroj de la sanskrita literaturo okazis

pli-malpli kiam en suda Eŭropo jam komencis la mezepoko, kaj en klasika sanskrita teatraĵo, parto de la dialogo - kiam parolas malaltklasuloj - estas fakte skribita prakrite, do mezhinde.

La plej grava parto de la mezhindaj literaturoj estas fakte kronologie pli malnova ol tiu de la prahinda. Temas pri la plej fruaj kanonaj libroj de la ĝajnismo (en PIV "ĝainismo") kaj budhismo, en po unu normigita prakrito. Tiu de la budhismo estis nomita "tekstlingvo", en tiu lingvo mem *pāli-bhāsa*, poste mallongigita al *pāli*.

Ŝajnas ke la unuaj ĝajnoj kaj budhanoj tre konscie uzis la popolajn lingvojn kaj evitis la elitisman sanskriton, sed kelkaj pli malfruaj budhanoj fine ekuzis la sanskritan, ne malofte en formo influita de pli malfruaj hindaj lingvoj, kaj nomita "budhisma hibridsanskrito".

Kunmetitaj vortoj

Mi supre diris ke videblas apartaj paraleloj inter lingvoj germanaj kaj hindaraj. Unu tia - apartaĵo kiun ni ne vidas ekzemple en la latina, sed jes ja en esperanto - estas la facileco fari vortkunmetaĵojn. Sanskritaj kaj paliaj gramatikistoj sisteme distingas inter ses apartaj klasoj de tiaj kunmetaĵoj, nome:

1. sanskrite *dvandva*, palie *dvanda* ("ĝemela"), kie du (aŭ pli da) vortoj estas kunmetataj anstataŭ meti inter ili "kaj". En esperanto mi nun memoras nur unu ekzemplon: "tagnokto", por "tago kaj nokto"; sanskrite multaj aliaj, ekzemple *mātāpita*, "patrino kaj patro", do "gepatroj".
2. sanskrite *tat-purusha*, palie *tappurisa* ("lia servanto"), kie la unua vorto havas alian kazon funkcion ol la dua, ekzemple sanskrite *svarga-gati*, "ĉiel-iro", por "iro al la ĉielo" aŭ *rāja-putra*, "reĝo-filo", do "reĝido".
3. sanskrite *karma-dhāraya*, palie *kamma-dhāraya*, kie la unua parto estas adjektiva kaj la dua substantiva, ekzemple *mahā-rāja*, "grandreĝo" (Ĉu tiaj konstruoj estas permeseblaj en esperanto estas diskutite, sed kelkaj estas fakte uzataj, kiel "grandurbo" kaj "bonamiko"). En la *karma-dhāraya*, la du partoj celas la saman aferon, dum en la *tat-purusha* malsamajn (en la *karma-dhāraya* "grandreĝo", la

grandulo estas identa kun la reĝo, dum en la *tat-purusha* "reĝido" la reĝo ne estas identa kun la ido).

4. sanskrite *dvigu*, palie *digu*, kie la unua parto estas numeralo, ekzemple sanskrite *tri-loka*, palie *tīloka*, "la tri mondoj". (En esperanto estas mal-facile trovi tiajn kunmetaĵojn kun ordinara substantivo kiel dua parto; iom marĝene oni eble povus menci "kvaropo" kaj "triuono", sed la rilato inter la partoj tie estas fakte ne tute simila.)
 5. sanskrite *bahuvrīhi*, palie *bahubhīhi*, kie la tutaj estas adjektiva, ekzemple sanskrite *mahātma*, "grandanima" (en novhindaj lingvoj uzata ankaŭ substantive kiel titolo), *an-anta*, "senfina", sanskrite *sa-bhārya*, palie *sa-bhāraya*, "kun-edzina". La esperantaj "mal"-adjektivoj povas esti rigardataj kiel ekzemploj.
 6. *avyayibhāva*, kie la tutaj estas ad- verbo kaj la unua parto nedeklinaciebla (ekzemple prepozicio), ekzemple *yathā-kāma*, "laŭdezire", aŭ *yāva-jīva*, "dumvive".
- Jen do nova bona kampo por esperantologoj, se ili ne havas pli gravajn taskojn!

Fonetiko

Se vi komparas la sanskritajn kaj la paliajn formojn supre, vi povas konstati gravan diferencon fonetikan: la sanskrita tre ŝatas multspecajn konsonantkombinojn, sed la palia evitas ilin per asimilo aŭ vokalensovo: *bahuvrīhi* > *bahubhīhi*, *karma* > *kamma*, *dhārya* > *dhāraya*. Interese, kelkaj novhindaj lingvoj same evitas kelkajn kombinojn, sed sen pasi la palian modelon. Ekzemple sanskrite *dharma* estas pale *dhamma*, sed sinhale *daruma*.

(En Eŭropo, similan evoluon vi povas vidi de la latina al la itala: *doctor* > *dottore*, *victoria* > *vittoria*, *Biblia* > *Bibbia*.)

La vokalaj *r* kaj *l* troveblas en la prahindaj lingvoj, sed malaperis jam en la mezhindaj (ekzemple *sanskṛta* > *sankhata*). Nuntempaj hindoj ofte, kiam ili elparolas sanskritajn vortojn, enŝovas vokalon - kiel la esperanta formo "sanskrito". (Aliflanke, kelkaj slavaj popoloj povas ankoraŭ perfekte prononci tiujn sonojn, ekzemple en

la ĉeĥaj loknomoj *Brno* kaj *Plzen*, kie la sonoj *r* kaj *l* estas, laŭ la difino de la hindaj gramatikistoj, fakte vokaloj.)

Gramatikaj nombroj

Ankaŭ la gramatiko simpliĝis. Ekzemple, la veda kaj sanskrita havas tri gramatikajn nombrojn (singul-laron, dualon kaj pluralon), sed la praktikaj jam perdis la dualon. Aliflanke, ili konservis ĉiujn ok kazojn, dum la latina havas nur ses (ĉar la instrumentalo kaj la lokativo ekhavis la samajn formojn kiel la ablativo, kaj la klasika greka nur kvin. Ankaŭ en la novhindaj lingvoj, la nombro malgrandiĝis - la hindia havas nur du.

Literoj

La skribsistemo de la sanskrita estis normigita nur malfrue. La pra- kaj mezhindaj literaturoj estis unuavice perbuŝaj, kaj dum longa tempo, ĉiu skribanto de tiuj lingvoj tutsimple uzis sian lokan hindsisteman skribon, sed ekde la dekoka jarcento (de nia erao), la devanagaria skribo estas ĝenerale uzata por la sanskrita (same kiel por kelkaj novhindaj lingvoj, kiel la hindia). Por la palia (kies uzantoj plejparte troveblas ekster la nuna hinda respubliko, precipe budhismaj monaĥoj en Cejlono, Birmo kaj Siamoj - aŭ Srilanko, Mjanmo kaj Tajlando, se vi preferas la registarajn neo-logis-

mojn), tia interkonsento ankoraŭ ne okazis, do la paliaj tekstoj troveblas kun literoj sinhalaj, birmaj, tajaj, kmeraj aŭ - lastatempe - devanagariaj; fakte, la unua presigita versio de la palia Tripitako estis prezentita per literoj latinaj, en Britio.

Ĉu lingvoj malproksimaj al ni? Nu, en ĉiuj vortaroj sanskritaj aŭ paliaj kun komparaj mencioj de paraleleaj vortoj en aliaj hindeŭropaj lingvoj, la lingvo plej citita estas - la litova, parolata pli proksime al Svedio ol al Hindio.

Gunnar Gällmo

EDUKADO

Eŭroskola en Esperanto

Marde, la 8-an de majo 2001, la grupo da Esperanto-ĝelernantoj ĉe la gimnazio de Lerum partoprenis la tiel nomatan Eŭroskolan tagon ("Eŭroskola") en la Parlamento de Eŭropa Unio en Strasburgo. Eŭroskola estas rolludo elpensita de la Parlamento por popularigi la Union inter gimnazianoj de la Uniaj landoj; la ĝejunuloj kunvenas en la Granda Salono de la Parlamento kaj diskutas en la Unio aktualajn demandojn, pri kiuj ili voĉas kiel veraj parlamentanoj. Tiu ĉi jaro estas kiel konate la "Eŭropa jaro de lingvoj", kaj la diskutenda demando evidente estis la rolo de la lingvoj en plivastiganta EU. Ĉu la EU-anoj volos unu oficialan lingvon?

Kelkaj francaj samideanoj sukcese klopodis por ebligi partoprenon de esperantistaj gimnazianoj. Komence oni intencis aranĝi Eŭroskolan tagon nur por esperantistaj ĝelernantoj, sed kiam montriĝis, ke ne sufiĉe da tiaj partoprenos, oni devis kontentigi sin per miksitaj Eŭroskola. Kompreneble estis premiite, ke nia lingvo estos egalrajtigata kun la dek unu oficialaj lingvoj de la Unio kaj tial estos interpretata dum la diskutado, sed tiel ne okazis. Strange ŝajnis ankaŭ, ke el la 171 esperantistoj, kiuj ĉeestis, nur 35 rajtis partopreni la efektivan Eŭroskolan en la plen-kunsida salono. Al la elektitaj 35, tamen, apartenis ĉiuj la svedoj, laŭ specifa deziro de la Parlamento; nia lando ĉi-duonjare ja estas la Unio.

Kiam la Leruma grupo eniris la promenhalon de Winston Churchill-domo en Strasburgo, la oficistoj klare montris, ke ni svedoj estas Tre Gravaj Personoj. Nombro da afablaj sinjoroj

en mallumaj kompletoj bonvenigis nin kaj helpis nin preterpasi la aliajn landogrupojn en la atendvico. Post la registrado nin ricevis alia afabla sinjoro kun alta frunto kaj mal-blondaj lipharoj: Gilbert Stambach, strasburga samideano, la viro, kiu per longedaŭraj kaj eltenaj klopodoj ebligis la Eŭroskolan en Esperanto. Oni ofertis matenmanĝon, kaj poste ĉiuj sidiĝis en kunvena salono. Tie okazis la elekto de la "bravaj tridek kvin", kiuj rajtis sidi en la Granda Salono: ĉiu landa grupo (Francio, Italio, Hungario, Rumanio, Kroatio, Litovio kaj Svedio) taĉmentis principe po kvin ĝelernantojn. Inter tiuj estis Gabriele Corsetti, filo de Renato Corsetti, kaj la franca gimnaziano Xavier Dewidehem, kiuj jam antaŭe estis proponitaj kiel prezidanto kaj raportanto de la Esperanto-grupo, kaj ankaŭ la juna rumanino Adela Micota. En la Granda Salono Gabriele prezentis sin kiel kandidaton por la prezidanteco de la Eŭroskola tago. Li paroladis tre bone, kaj lia Esperanto (li estas denaskulo) estis interpretata al la tuta aro en la franca de Xavier. Dum la voĉdonado li ricevis konsider-indan nombron da voĉoj, pli ol 150; elektita, tamen, estis aŭstra knabino.

Posttagmeze la diversaj grupoj diskutis la donitan temon, "Komuna lingvo por interkomprenado". Jam iujn semajnojn antaŭe prezentiĝis interrete propono pri Esperanta rezolucio. Tiu ĉi propono estis verkita de Xavier helpata de la esperantista veterano Claude Longue-Épée. La rezolucio estis ĉiel tre bona ("pli ol perfektega", komentis Renato Cor-

setti) kaj estis akceptita de la tuta esperantista aro kun etaj aldonoj kiel ĝia rezolucio. Poste, en la Granda Salono, Xavier laŭregule resumis sian proponon, kiun Adela poste laŭtlegis; ambaŭ forte impresis pro ilia certeco. Sekvis konsiliĝo inter la grupaj plejdantoj por vortigi komunan proponon pri decido (ĉio ja devis okazi precize kiel en la vera Parlamento).

La fina rezulto de ĉio ĉi estis eldiro, ke lingvosocioj ĝenerale ege gravas, ke ĉiuj lingvoj kaj kulturoj en Eŭropa Unio estu subtenataj kaj protektataj, kaj ke starigo de unu oficiala lingvo de la tuta Unio estus praktika, tamen neblas akordiĝi pri kiu lingvo. Menciitaj kiel penseblaj estis la angla kaj Esperanto.

Dum la tagmanĝo, kiun ofertis la Parlamento, estis dirite, ke la gravo de la tago konsistas en la fakto, ke la plej multaj el la kunvenintaj ĝejunuloj supezeble unuafoje aŭdis pri la Internacia Lingvo kaj aŭdis sam-sortanoj paroli ĝin. Ke ilia intereso estis vekita, estas certe. Ankaŭ la francaj amaskomunikiloj tre ek-interesiĝis; pri tio raportis ĵus Gilbert Stambach. Krome, al la ĉeestantaj oficistoj de la Parlamento tre verŝajne imponis la brila apero de Esperanto kaj ĝiaj parolantoj.

Resume, estis historia okazaĵo, kiu nepre havos sekvojn.

Folke Wedlin,
instruisto kaj akompananto
de la sveda grupo:
Björn Jansson
Caroline Johansson
Jerry Johansson
Jonas Silverborn

Ett personligt vittnesmål om en internationalists verk

För några månader sedan kom Nina Langlets bok *Kaos i Budapest ut på esperanto, i översättning av Kalle Kniivilä och med kommentarer av tidningen Esperantos redaktör István Ertl.*

Boken inleds med ett förord av Humphrey Tonkin. Detta förord publicerar La Espero här på svenska.

Utgivningen av *Kaos i Budapest* i esperantoöversättning närmast fullständig bilden av Valdemar Langlets karriär.

Under mer än ett halvt århundrade av märkliga gärningar visade han hur det vore att verkligen leva ett internationellt liv. Langlet var bland de första, som fann ett annat sätt att leva genom det nya *Lingvo Internacia*, som Zamenhof presenterat för världen 1887.

Langlet var bland de första, som började använda Zamenhofs nya språk i Sverige. Redan 1891, 19 år gammal, fanns han med bland grundarna av en grupp övertygade esperantister vid universitetet i Uppsala.

Esperanto började utbredas i Ryssland och därför reste Langlet dit tillsammans med en annan ung svensk. Det var inget vanligt besök. De reste dit för att rida över stora distanser, använda det nya språket och rapportera till svensk press. Under resan besökte Langlet den store författaren Tolstoj, vars liberala idéer var till ständigt förtret för den reaktionära ryska regimen. Dessa idéer bidrog till de första statliga förbuden mot esperanto, ett språk som ofta förföljts och bemötts illa.

Langlet besökte ofta Ryssland under de följande åren. Han var med vid kröningen av den siste tsaren, vilket hans andra hustru Nina skriver om i den här boken. Med första hustrun Signe reste han på bröllopsresa till Samarkand 1899. Signe var en svensktalande esperantist från Finland. Hon dog redan 1921.


Nina Langlet ger i sin bok grundläggande detaljer om de följande händelserna i Budapest. Nina var dotter till en av de stora pionjärerna i den ryska esperantorörelsen, den berömde Borovko. Till honom hade Zamenhof skrivit ett långt berömt brev om hur *Lingvo Internacia* kom till. Brevet citeras i varje Zamenhofbiografi.

Langlets andra gifte förenade esperantos början i två länder – Ryssland och Sverige.

Det är viktigt att notera, att Langlet sedan sin ungdom var en övertygad internationalist. Han gjorde karriär genom sina internationella intressen och levde på många sätt ett nytt slags liv, möjliggjort genom esperantos tillkomst 1887.

Esperanto var en del av en hel re-

volution inom fysisk och elektronisk kommunikation, jämförbar med dagens. Under åren kring språkets tillkomst skapade järnvägarna snabb och billig fysisk kommunikation, åtföljd av andra lika effektiva tjänster. Telegrafi och telefoni gjorde personlig kommunikation möjlig över stora avstånd.



Det uppstod en ny slags internationell livsstil, tillgänglig för den stora medelklassen, den som samtidigt konstruerade och satte igång systemen. Medelklassen tjänade på systemens nya möjligheterna till en internationell gemenskap av människor med samma intressen.

Det grundades också internationella organisationer för att reglera de nya banden mellan stater. Esperanto var en del i denna första stora internationalisering, och många esperantister fann i språket ett nytt sätt att nå ut i världen. Om någon var typisk för detta nya så var det Valdemar Langlet.

En annan person, som delvis tack vare Zamenhofs språk verkligen hade händerna fulla, var Teodor Schwarz [Tivadar Soros]. Hans memoarer, *Maskevad kring döden*, om upplevelserna under den nazistiska ockupationen av Budapest, kommer ungefär samtidigt på esperanto.

Soros upptäckte också tidigt esperanto, på de östliga slagfälten under första världskriget. Hans lärare där var soldaten-kamraten Pál Balkányi.

Efter årtal som krigsfånge i Sibirien flydde Soros från sitt fängelse. På hemvägen deltog han i grudandet av den första esperanto-organisationen i Moskva. Därefter lanserade han tidskriften *Literatura Mondo* tillsammans med vännerna Kalocsay och Baghy, portalfigurer inom esperantorörelsen i Budapest.

Soros son, finansmannen George Soros, säger ofta att faderns hela äventyrsfyllda liv till dess att nazisterna kom till Budapest, bara var en förberedelse för livets största utmaning: kampen mot den nazistiska invasionen.

Enligt sonen var det faderns viktigaste tid, då all dennes erfarenhet, all skicklighet som han tillägnat sig under årtionden, sattes på sitt största prov, och triumferade.

Likadant var det med Langlet. Han promenerade längs samma gator som Soros, såg samma vyer, men stod inför en annan situation. Langlet hade kommit till Budapest som lektor i svenska vid universitetet, just vid den tid då Hitler tog makten i grannlandet Tyskland. Och just vid den tid då den ungerska esperantorörelsen nådde en storhetstid av litterär och språklig blomstring.

I Budapest fann han ett inspirerande och pulserande esperantoliv. Parallellt med sina uppgifter vid universitetet började han arbeta för svenska konsulatet. När den tidigare legationen i Wien på grund av Hitlers annektering av Österrike flyttade till den ungerska huvudstaden blev hans uppgifter allt intensivare.

Han stannade kvar i Budapest medan krigsmolnen förtätades och det civila ungerska livet blev allt svårare.

Fastän han var hela 72 år när nazisterna kom 1944, kastade han sig in i det farliga och slitande motståndsarbetet mot nazisterna. Som delegat för svenska Röda korset i Ungern ägnade han sig åt att rädda judar*. Dessa var redan dödsmärkta genom att Adolf Eichmann och administratio-

* Valdemar och Nina Langlet såg det som sin plikt att bistå alla som behövde hjälp, inte bara judar, i motsats till Raoul Wallenberg. Även politiskt förföljda, d.v.s. vänstersympatisörer, fick deras hjälp, vilket användes mot paret Langlet när de återkom till Sverige 1945 och blev utfryssta av etablissemanget. (F. Luin)

nen för den så kallade slutliga lösningen anlände till Ungern.


Allvaret i detta hot kan inte överdrivas. Eichmann längtade sedan år tillbaka efter att likvidera de ungerska judarna, som fram till 1944 inte drabbats av samma öde som judarna i andra länder direkt under tyskt styre.

Antisemitismen i Ungern var visserligen stark under den halvfascistiska Horthyregeringen, som innehaft makten sedan början av 1920-talet. Men Horthy och hans kolleger motstod alltid försöken att effektivt utrota de ungerska judarna. Det fanns en viss social jämvikt mellan på ena sidan den kristna adeln och på den andra de judiska industrimännen, som i sin tur levererade medel för ett fortsatt gott liv.

Nazisternas ankomst i mars 1944 (Eichmann anlände med ett av de första tågen från Berlin) öppnade ett strålande perspektiv för Eichmann.

I Tyskland och Polen hade nazisterna kämpat med dålig organisation, med juridiska och sociala hinder och med otillräcklig utrustning för att, på det mest fasansfulla sätt, eliminera judarna.

Nu väntade ett nytt land, där den förbättrade dödsmaskinen kunde gå fram slagkraftigt och få sitt första obehindrade prov...



Nina Langlets *Kaos* i Budapest på svenska, utgiven 1982

Mot detta gigantiska maskineri slogs Langlet. På några veckor var judarna från ungerska landsbygden hopfösta som boskap i läger i väntan på transport till Auschwitz; på några månader försvann de i stor utsträckning i gaskamrarna.

De var många, dessa landsbygdjudar. I motsats till exempelvis Österrike, hade judarna i Ungern som bodde utanför huvudstaden haft det bra under många år. De levde alla som relativt små minoriteter på sina bostadsorter och vanligen utan större fysiska risker.

Ett undantag var perioden kring 1920. Då fanns en ilska mot bolsjevismen ovanpå en latent antisemitism. Den resulterade i pogromer i olika delar av Ungern.

Det var inget större problem att övertyga ickejudaerna att låta sina judiska grannar försvinna, speciellt i en tid då de ekonomiska villkoren på grund av kriget var dåliga. De ungerska landsbygdjudarnas grannar var för det mesta likgiltiga när nazisterna marscherade in.

Grannarna var vana vid lag och ordning och ändå redo att svälja de nya åtgärderna, om de gav ett sken av ordning. Langlet, som genast förstod situationen, konstaterade helt riktigt att man kunde undergräva denna likgiltighet genom att riktigt stärka ordningskänslan. Om man, i ett land som älskade officiella papper,

gav judarna dokument som gav intryck av att de stod under beskydd av Röda Korset i ett neutralt land, skulle möjligen tveksamma myndigheter respektera dessa dokument.

Om resten av historien får läsaren veta mer i denna bok av Nina Langlet – men en ständigt intressant fråga i denna ungerska situation är just de 'officiella' papperens sociala status, skenbar ordning i en väsentligen rättslös situation.

En liknande situation kunde man finna i Sydafrika under efterkrigsåren: också där legitimerade skenet av ordning rasåtskillnaden – och till slut kastade denna respekt för ordning omkull den. Då förläggaren Juan Régulo Pérez 1965 i sitt förord till *Maskerado ĉirkaŭ la morto* [Maskerad kring döden] pekade på de svarta amerikanerna, hade han inte fel: ett liknande missbruk av lag och ordning upprätthöll hindren mellan raserna.

I dag förstår man bättre de så kallade rättvisediplomaternas roll, de som ofta trotsade till och med den egna beskickningen för att rädda judar. Sådana som amerikanen Hiram Bingham som fritt lämnade ut visum och officiella papper med USA:s sigill till bland andra Marc Chagall, André Breton och Max Ernst. Han gjorde det helt utan sina överordnades vetskap (han avrättades till slut). En annan är Feng Shan Ho, som arbetade på motsvarande sätt i Wien 1938 till 1940 trots instruktioner från sin regering. Män som Aristides de Sousa Mendes, konsulin som lämnade ut portugisiska visum från sitt skrivbord i Boreaux. Eller som Chiune Sugihara, som inom en månad 1940 levererade visum till tusentals litauiska judar, som flydde genom Kobe i Japan till USA, Kanada, Australien, Palestina och andra länder; män som påvens sändebud Angelo Rotta, den spanske legationschefen Don Angel Sanz-Briz, den schweiziske konsulin Carl Lutz, alla i Budapest. Och, mest känd av alla, Raoul Wallenberg, det neutrala Sveriges utsände, som sedan försvann i Sovjets fångelser. I denna lista har också den äldrande Valdemar Langlet en framstående plats.

Han gjorde det han kände vara en mänsklig plikt att göra. Man kan nog tillägga, att livet som esperantist och det internationella livet överhuvudtaget förberedde honom för detta ögonblick. Det bör kanske sägas, att medan övriga på min lista var yrkesdiplomater så var Langlet universitetslärare, som på intet sätt var tvingad att försätta sig i det moraliska dilemma, som varje formell diplomat mötte under dessa månader i Ungern. Han gjorde helt enkelt det han gjorde, som människa och som esperantist.

Universella Esperantoförbundet (UEA) flyttade till Schweiz i början av

förre seklet. Då tycktes människorna där, och speciellt initiativtagaren Hector Hodler själv, se esperanto som en intellektuell parallell till Röda Korset. Detta skapades och grundades i Schweiz. Hodler själv tillämpade de här principerna under första världskriget, då UEA blev kommunikationscentral för familjer som splittrats av kriget. Langlet, ledare för svenska Röda Korset i Ungern, använde samma principer som Hodler. Och i bakgrunden fanns Zamenhof själv, en jude som trodde på internationell kommunikation och fred.

Inom esperantovärlden har vi nu berättelsen och minnet av dessa upplevelser. Det mänskliga minnet, en så mystisk och ibland så långt ifrån perfekt förmåga, ger oss möjlighet att bedöma nutiden genom jämförelse med dåtiden och gå mot framtiden utrustade med samsman av de erfarenheter och berättelser vi fått oss till dels. "*Adiaŭ, filo, kaj memoru min*" [Adjö, son, och minns mig] säger den gamle Hamlets ande i Zamenhofs översättning, då den försvinner i gryningen. Genom enbart minnet av hans fruktansvärda hälsning, skulle Hamlet kunna försöka återställa det ruttnande rike, vars kronprins han är. Men han tror inte helt på minnet: sedan spöket försvunnit försöker han maniskt skriva ut meddelandet: "*La tabuleton donu! Mi enskribos.*" [Ge mig skrivtavlan! Jag skall skriva ner det.] På så sätt blir ett muntligt meddelande en skriven text, och den skrivna texten har förmågan att bli kvar för evigt.

Andra världskriget försvinner, liksom kung Hamlets ande, snart i det levande minnets för dunkling. De som bekräftat det försvinner en efter en, och blir själva bara minnen. Paradererna av veteraner blir för varje år allt kortare och marscherar mindre raskt. Våra föräldrar, som överlevde bomberna och misären, dominerar inte längre våra liv utan försvinner in bland albumens foton och skåpens brevbuntar. Alltför snabbt försvinner de levande rösternas tid; texter, bilder och ljudinspelningar ersätter den.

Desto viktigare är det då att Valdemar och Nina Langlets röster fortsätter att ljuda i våra minnen. Lyckligtvis får vi genom István Ertls kunniga noter en historisk bakgrund till den enkla berättelse, som så skickligt översatts av Kalle Kniivilä. Det är ju, som den mytiske Hamlet påpekar, nödvändigt att minnas alla detaljer. "Adjö, läsare, och minns mig", säger rösterna. "Vi skall skriva ner det," svarar vi.

Humphrey Tonkin
Översättning: Anita Dagmarsdotter

Inter koreaj esperantistoj



Kelkaj kurs-partoprenantoj en la Kulturcentro en Seulo

Mia nomo Lindblom troviĝas sur tomoŝtono, kiu staras sur deklivo iom ekster la ĉefurbo. La ŝtono staras sur la tomo de mia bopatro. Tie estas skribitaj la nomoj de liaj infanoj kaj de edzoj, edzinoj de la infanoj.

Dum tuta junio Boo Mee kaj mi rondvojaĝis inter pluraj koreaj urboj laŭ preta plano, kiun la asocia prezidanto Lee Chong-Yeong pretigis post multaj kontaktoj kun klubaj reprezentantoj en la tuta lando. Se vi rekonas la nomon Lee Chong-Yeong, vi scias ke li estis prezidanto de UEA 1994-97. Nun li estas vicprezidanto de la UEA-estraro kaj respondecas pri eksteraj rilatoj.

Ni renkontis pli ol 300 personojn en 16 diversaj lokoj. Alia Lee, nome Jung-Kee, invitis nin al du klasoj en la universitato Dankook, kie li instruas eperanton. Entute en la du grupoj ni renkontis 80 studentojn. Ili ĉiuj stariĝis demandojn, kiujn ili preparis.

Lee Jung-Kee estras je propra iniciato Kulturcentron en Seulo. Tiun lokalon ni vizitis dufoje, kiam okazis kursoj.

Kun Lee Jung-Kee ni ankaŭ vizitis klubeton en la "ceramika urbo" Ichon. Tie ni renkontis klubanojn, sed ankaŭ grupon de komencantoj (10), kiuj ricevis sian unuan lecionon. Mi parte helpis instrui, precipe por ke la komencantoj aŭdu la elparolon de persono el alia lando.

En la ceramika urb(et)o troviĝas ceramikisto, unu inter la plej famaj en Koreio. Ni vizitis lian atelieron kaj priĝardis la ege belajn artaĵojn. Poste ni estis invititaj en belan ĉambron por

tetrinkado kaj babilado. Li montris nun, ke li havas iom da intereso por esperanto, kaj antaŭ ol ni adiaŭis lin, li promesis ke la klubanoj en Ichon povos utiligi lian belan ĉambron por kunsidoj kaj kursoj!

En la grandega havenurbo Pusan la klubo havis lokalon en la supra etaĝo de lernejo por edukado de subflegistinoj. La posedanto, frato de Lee Chong-Yeong, ankaŭ subtenas la disvastigon de esperanto. Pro tio la kursaninoj studas esperanton unuhore semajne. Ni renkontis du klasojn po unu horo kaj informis pri niaj sper-

universitato, sed li ankaŭ instruas esperanton al studentoj tie. Li multe okupiĝas pri sia interreta radio – rigardinda kaj aŭskultinda. Lia granda kontribuo al la koreaj esperantistoj estas liaj dikaj ampleksaj vortaroj. Ambaŭ vortaroj havas po pli ol mil paĝojn.

Alia parto de nia vizito en Koreio temis pri kvartaga vizito ĉe speciale interesa centro por budhismeca religio. Pri tiu interesa vizito mi rakontos en alia numero de *La Espero*.

Roland Lindblom



toj en Esperantujo, laŭ la deziro de la rektoro-posedanto.

En la urbo Chonan ni renkontis la ĉefdelegiton de UEA, Ma Young-tae. Li estas estro de la biblioteko de la

Vizito ĉe la Esperanto-Centro de KEA en Seulo ...

... kaj en lernejo de subflegistinoj en Pusan, kiuj ankaŭ lernas esperanton.



Prenumerationer 2002

UK i FORTALEZA, Brasilien, 3 - 10 augusti, 2002

SEF erbjuder dig att prenumerera på esperantotidningar för år 2002. Du beställer tidningar genom att sätta in pengar på postgiro 14 74 29 - 5, SEF specialkonto, samt att på talongen ange vilka tidningar, som avses.

Vill du fråga något ytterligare är du välkommen att kontakta Lisbet Andreasson, Södra Rörum pl 455, 242 94 Hörby, telefon 0415-50152

Tidning	Nr/år	Pris kr
Brazila Esperantisto	4	160
Esperanta Finnlando	6	135
Esperanto	11	310
Esperanto-Dokumentoj	10	240
Esperanto en Danio	5-6	140
Eventoj	23	340
Ret-Ventoj (nästan dagligen-ange e-postadress)		210
Fonto	12	320
Heroldo de Esperanto	17	300
La Hirundo	8	100
ICEM	4	185
Informoj de EAE		
(Esperanto Asocio Estonio)	4	80
Juna Amiko (rabatter vid mer än 1 ex)	4	110
Komencanto (större nummer)	6	150
Kontakto	6	185
La Jaro	årskalender	47
La Kancerkliniko	5	200
La Ondo	12	240
Literatura Foiro	6	280
Litova Stelo	6	140
Monato	12	360
Monato, retversio	12	222
Norvega Esperantisto	6	100
Oomoto	2	100
Rok' Gazet (pris för 3 nr)	1	160
Scienca Revuo	4	200
TEJO tutmonde	4	95

La silento pli parolas

Tuj kiam mi eniris la parlamenton dum la unua tago de la Stokholma Kongreso, haltigis min juna samideano, kies naciego laŭ la aspekto estis Sud-Eŭropano.

"Saluton, samideano, de kie vi estas?" li min demandis.

"De Java. Kongresnumero 1763."

"O, pardonu min, mi havas mal-grandan peton al vi."

"Petu!" mi respondis kaj li prenis el sia poŝo libreton, kies bela kaj luksa bindaĵo jam perfidas la gravan enhavon.

"Samideano, mi kolektas ĉi tie tradukojn de 'Mi amas vin'. En la libreto jam estas en 35 diversaj lingvoj. Ĉu vobus ankaŭ tion traduki en vian lingvon?"

"Jes, tio ne ekzistas."

"Ne ekzistas? La javanoj ja ankaŭ konas la amon."

"O jes, sed en Java, se oni amas, oni nenion diras."

(El La Espero 3/1936)

Anmälningssavgifter (svenska kronor)

	- 31/12-	31/3-02	1/4 -
1. Icke direkt medlem i UEA	1500	1870	2250
2. Direkt medlem i UEA (ej MG)	1200	1500	1800
3. Medföljande, handikappad eller ungdom (född mellan 72-01-01 och 81-12-31), som inte är medlem i UEA	900	1120	1350
4. Medföljande, handikappad eller ungdom, som är medlem i UEA	600	750	900

Handikappassistenter och ungdomar födda efter 81-12-31 betalar ingen kongressavgift. I händelse av kursändring kan kongressavgiften komma att justeras.

Anmälningssblankett för kongressen kan beställas hos: Lisbet Andreasson, Södra Rörum pl 455, 242 94 Hörby, tel 0415-50152

Blanketten skickas tillbaka till samma adress. All betalning sker till postgiro 14 74 29-5, Esperantoförbundet, Specialkonto.

UEA behöver dig – Du behöver UEA

Ett starkt UEA kan hävda sig bättre i en värld, som idag mer än någonsin behöver ett neutralt språk. Stöd därför UEA med ditt medlemskap.

För din egen del betyder det att du får UEA:s årsbok med namn och adress på delegater i hundratalet länder, och om du är MA medlem får du även tidningen Esperanto, som ger dig värdefull information om vad som händer i esperantovärlden. Dessutom ger medlemskapet dig rätt till lägre kongressavgift.

Du betalar avgiften genom att sätta in pengarna på postgiro 14 74 29-5, SEF specialkonto. Ange på talongen vad pengarna avser.

Vänlig hälsning

Lisbet Andreasson, Södra Rörum pl 455,
242 94 Hörby, Tfn 0415-50152

Avgifterna för 2002 är följande:

Kategori:

MA	Direktmedlem med årsbok och tidningen Esperanto. Om man är under 30 år blir man automatiskt medlem även i TEJO och får Kontakto. Ange födelseår!	480 kr
MJ	Direktmedlem med årsbok. Om man är under 30 år blir man automatiskt medlem även i TEJO och får Kontakto. Ange födelseår!	190 kr
MG	Direktmedlem med Gvidlibro. Ger inte nersatt kongressavgift.	80 kr
SZ	Avgift för Societo Zamenhof, särskild stödorganisation. Ger inte medlemskap i UEA.	960 kr
PT	"Patrono de TEJO" får tidningen Kontakto.	570 kr
DM	"Dumviva Membro", betalar för hela livet. Får tidningen Esperanto och årsboken.	12 000 kr
DMJ	"Dumviva Membro kun jarlibro", betalar för hela livet. Får årsboken.	4 750 kr
DPat	"Dumviva Patrono", betalar för hela livet. Får tidningen Esperanto och årsboken och blir därtill ständigt medlem i Societo Zamenhof.	120 000 kr
DPT	"Dumviva Patrono de TEJO" betalar för hela livet och får tidningen Kontakto.	14 250 kr



Jarkunveno de KELI

La sveda sekcio de KELI havis sian jarkunvenon en la Esperantocentro la 5-an de majo 2001. Nur 7 membroj partoprenis. Post diserveto kun parolo de Mats Landfors ni sekvis la tagordon kaj elektis estraron por du jaroj. Ĉar neniu juna homo en la kursoj de Lars Forsman volis iĝi membro de KELI kaj ankaŭ ne de SEF, ni sentis nin devigitaj por la dua jaro likvidi la svedan sekcion. Tamen ni elektis laboran komitaton por aranĝi ekumenan kongreson en Svedio tuj post la UEA-kongreso en Göteborg.

La komitato konsistis el la sekvaj personoj: Mats Landfors, Arne Lundkvist, Agneta Järlström kaj Bengt-Olof Åradsson kiel komitata prezidanto. La jarkunveno sendis skribaĵojn al la internacia estraranoj de KELI kaj al IKUE kiel reprezentanto de la katolikoj pastro Bernhard Eichkorn. Kiel kongresa loko povos okazi Karlskoga Popola Altlernejo, La Popola Altlernejo de Södra Vätter-bygden en Jönköping aŭ Värnamo Popola Altlernejo. Montriĝis, ke estos tro multekoste en Karlskoga. Pro tio la kongreso povos okazi en Smolando.

Ni deziris esti sekcio de SEF. Tiam la Sveda Esperanto Federacio povas peti la KELI-sekcion aranĝi kongreson. Dum la jarkunveno de SEF en la Esperanto-domo en Lesjöfors ni petis iĝi sekcio de SEF kaj tio estis aprobita.

Arne Lundkvist

Nia klubejo en la televido

Lunde 22 januaro vizitis la klubejon televida teamo de TV4 Gotenburgo, kiu estis preparanta programon pri la kluba vivo en Gotenburgo kadre de la televida serio "Cityliv" (Urba vivo) por sendi en la digitalaj elsendoj. Haste ni kunvokis kunsidon de la UK-grupo, kiu ja kadre de LKK laboras pri planado por UK 2003, ĉar la televida ĵurnalistoj volis filmi kluban aktiv-econ. Samtempe ni povis informi pri UK 2003. La kameraisto filmis nin ĉiuflanke ĉirkau la tablo dum la kunsido. Poste la ĵurnalistoj intervjuis Christer Lörmemark kaj Aira Kanckunen.

La televida programo estis dissendita la 18-an de februaro. La programo prezentis kelkajn diverstipajn klubojn en Gotenburgo – krom nian klubon, du dancgrupojn, unu bosnian kaj unu pri mezepokaj dancoj,

plue sportan klubon, la ordenan societon Göta Par Bricole k.a. La prezentado de nia klubo estis sufiĉe pozitiva. Ĉar neniu el ni povas vidi la digitalajn elsendojn, ni maltrafis la elsendon, sed ni ricevis de TV4 videobendan kopion de la programo, kiun ni montris al interesitaj klubanoj ĉe Siv kaj poste ĉe Ali...

Andreas Nordström

I dags- och månadstidning

Vi hade i våras en lyckad "propagandaartikel" om den 3-språkiga familjen Svenonius i *Sydsvenska Dagbladet*, som berättade positivt om esperanto och som tack vare en stor bild dragit till sig många ögon och intresse.

Här om dagen blev vi på nytt intervjuade, denna gång för *Hemmets Journal*, månadstidning med 250.000 exemplar, av en mycket intresserad ung dam.

Förhoppningsvis får även denna en god genomslagskraft. Artikeln beräknas komma om ett par månader.

Vad gör man inte för esperanto?

Sten Svenonius

Forskning om Oomoto och esperanto

Många esperantister känner igen ordet "Oomoto", som är en japansk religion som ger ut en tidning med samma namn och som dessutom brukar informera om sin verksamhet på de internationella esperanto-kongresserna.

Vid sidan av shinto, buddhism och kristendom finns hundratals nya religioner i Japan. De är ofta en blandning av de äldre religionerna, men innehåller också nya uppenbarelser. En av dessa nya religioner är Oomoto, som har ca 200.000 anhängare i Japan. Oomoto har sedan 1923 aktivt stött esperanto. En av grundtankarna i Oomoto är att Oomoto är en förebild för världen. Det gäller att om Oomoto håller fast vid rätta och goda idéer så sprider sig detta i världen, tänker man sig. Oomoto arbetar även för att bilda en världsfederation. Inom Oomoto är konstutövning mycket viktigt.

Leif Nordenstorm, är esperantist och präst i Boden, håller sedan en tid tillbaka på med en doktorsavhand-

ling i religionshistoria om Oomoto och deras intresse för esperanto. Den beräknas vara klar 2002.

Leif Nordenstorm

Ekspozicio en gimnazio Hvitfeldt

Posttagmeze 15 majo okazis ekspozicio pri Esperanto en la gimnazio de Hvitfeldt en Gotenburgo. La ekspozicio estis parto de Tago de lingvoj en la gimnazio, okaze de la Jaro de lingvoj, proklamita de EU. Ne tiom da gejunuloj vizitis la ekspozicion, kredeble pro tio ke ĝi okazis en ĉambro alte en la lernejo, sed tiuj, kiuj sukcesis trovi la ĉambron, estis des pli interesitaj. Du gejunuloj el la esperanta klaso de la gimnazio de Lerum kaj unu el Hvitfeldt funkciis kiel gvidantoj, kune kun membroj el nia klubo. ĉefe Siv Burell.

Andreas Nordström

Informitaj gimnazianoj

Eŭropa jaro de la lingvoj. Dum tia jaro esperantistoj havas pli bonan ŝancon informi pri la diversaj avantaĝoj, kiujn ni esperantistoj trovis en "nia" lingvo.

Gimnazio en Täby, norde de Stokholmo, preparis tuttagan informadon pri lingvoj, kaj ekhavis ideon inviti iun esperantiston, kvankam neniu instruisto multon scias pri esperanto en tiu lernejo. La 26-an de septembro – "la tago de la Eŭropa jaro de la lingvoj" – mi enpakis multajn librojn kaj gazetojn en la aŭton, kaj post kelkminuta veturo mi malfermis la aŭtopordon por Jessica Hanmeier, kiu havis tempon partopreni en la informado antaŭ 130 gimnazianoj.

La aranĝantaj instruistoj kaj la rektorino tre afable bonvenigis nin kaj ni tuj eksentis ke ili vere ĝojas pri nia ĉeesto.

La 130 gimnazianoj estis dividitaj en kvar grupojn, kaj ni havis 40 minutojn je dispono por ĉiu grupo. Mi vekis scivolemon komence, kiam mi demandis ĉu ili vidis ke la svedaj telefonlibroj surhavas vorton en esperanto frontpage. La vorto ENIRO estas la firmonomo de la nova entrepreno, kiu prizorgas telefonlibrojn en Svedio. Kiam la firma ENIRO informis pri sia nova nomo, oni komentis, ke la nomo originas el vorto en esperanto.

Roland Lindblom

Elementa lernejo en Tyresö

Ankau la lernejo Nyboda en Tyresö aranĝis "lingvan tagon" kaj Boo Mee Kim-Lindblom (instruisto tie) ricevis lokon kaj tempon informi pri esperanto. La lernantoj ricevis lingvan informon; poste ili ricevis taskon traduki. Tiuj kiuj senerare tradukis, ricevis esperantajn glumarkojn. Entute Boo Mee informis al 250 infanoj.

Roland Lindblom

300 gimnazianoj aŭskultis al Lars Forsman

Lars Forsman, la fervora kaj entuziasmiga instruisto kiu gvidas la esperanto-instruadon en Karlskoga Folkehögskola, estis invitita al gimnazio en Örebro. Li devis en unu fojo informi antaŭ 300 gimnazianoj, kiuj inter aliaj lingvaj prezentoj elektis unuhoran informadon pri esperanto. Forsman estis tre kontenta pri la aŭskultantaj gejunuloj, ĉar ili atente absorbis tion kion li regalis. Venis proponoj de la gimnazianoj, ke la lernejo devas enkonduki esperanton. Forsman ricevis impreson, ke la rektoro pretas agi por tio.

Roland Lindblom

Sommaren på Esperanto-Gården

Esperanto-Gården gästades i somras av ett tiotal "ungomar" i alla åldrar. De kom från olika europeiska länder, från Mexico och en något äldre man från Australien.

De hade rest dit för att under Karl Elofssons ledning snygga upp trädgården och göra underhållsarbeten på husen.

Första veckan deltog alla "volontulor" i den traditionella sommarkursen i esperanto, som sedan är det gemensamma arbetspråket.

Sommarkursen hade 40-talet deltagare och fyra lärare/ledare. Åldersspridningen var stor, från 3 1/2 till pensionärer. I barngruppen deltog sex, medan de större barnen deltog i klassundervisningen. Inte minst barngruppens sång- och teateruppvisningar på kvällarna rönt stor uppskattning. Gruppen leddes av Beatrix Svenonius. Lärare var i övrigt Lars Forsman, Georgo Handzlik och Natalia Bertse.

Kursen och arbetsbrigaden uppmärksammades av regional press och teve.

Bengt Nordlöf

SKOLFORUM

Pli ol 20 000 vizitantoj!

Dum oktobra feriosemajno pedagogoj vizitis en Stokholmo la grandan ekspozicion **Skolforum** rilatanta al instruado. Multaj el ili vizitis la budon, kie Sveda Esperanto-Federacio, Sveda Esperantista Junulara Unuiĝo kaj Eldona Societo Esperanto informis pri Esperanto.

La celo estis dismontri esperantan literaturon, informi pri diversaj eblecoj lerni esperanton kaj doni instigon al lingvoinstruistoj instrui ankaŭ esperanton.

Pli ol 300 interesitoj estis aparte informitaj. La unua letero de la korespondanta kurso estis je dispono.

Esperanto en Väsby aperigis kaj disdonis specialan numeron de *La Hirundo*, kiu enhavas artikolojn i.a. pri Karlskoga Folkehögskola, ILEI, Euroskola kaj la sveda esperanto-ekzameno.

Per resendo de disdonitaj poŝtkartoj la instruistoj havis eblecon montri sian intereson por specialaj kursoj.


Kaisa Hansen
(el *La Hirundo* 026)

Pli kaj pli da Zamenhof en eLibrejo

Realigas la programo publikigi la verkojn de L. L. Zamenhof kiel eLibrojn. Al la jam aperintaj tradukoj de *Fabeloj* de H. C. Andersen, *Marta* de E. Orzeszko, *La batalo de l'vivo* de C. Dickens baldaŭ aldoniĝos liaj tradukoj de mondfamaj teatraĵoj, el kiuj *Georgo Dandin* de Molière jam aperis. Pluraj

el liaj originalaj verkoj jam ricevis libro-formon: la eseoj *Esenco kaj estonteco de la lingvo internacia*, *Lingvaj respondoj*, *Esperanta proverbaro* kaj liaj *Paroladoj*. Planata estas eldono de aliaj eseoj, kolekto de gazetartikoloj (en pluraj eLibroj) k.a.

La elektronikaj libroj de eLibrejo estas elŝuteblaj senpage ĉe www.esperanto.nu/eLibrejo kaj www.esperanto.se/eLibrejo.



Eta kaoso antaŭ kaj en la Esperanto-budo ...

... fariĝis alloga angulo por disdono de informoj pri esperanto.



Nova memorhelpilo

En www.mikox.de/memoro.htm vi trovos novan memor-helpilon, kiu utilas por enmemorigi vortojn. Ĝi taŭgas pli bone por lerni Esperanton ol por lerni iun alian lingvon (escepto: lerni alian planlingvon). En www.mikox.de ekzistas ankaŭ versioj en la germana kaj en la angla.

(E/NUN)

DONACOJ

RONDO LANGLET
Leif Nordenstorm,
Boden, 150 kr monate
Lennart Sundman,
Västerås, 100 kr monate
Wim Posthuma,
Västerås, 100 kr monate
Bengt Nordlöf,
Stockholm, 84 kr monate
Sten Anders Han-
nerz, Skogås, 84 kr monate
Yngve Sörman
5.000 kr unufoje
K. Fossevall, Mal-
mö, 3.000 kr unu-
foje
Ingrid Ottosson,
Vällingby 500 kr unufoje
Tore Johansson,
Kalmar 100 kr monate
Signhild Johansson,
Kalmar, 100 kr monate
Gurli Svensson,
Malmö, 100 kr monate

CETERE

N O Linnermark,
Farsta 20 kr
Rune Moln, Jönkö-
ping, 200 kr
Elsa Dahlqvist,
Motala, 500 kr
Elisabeth Nord-
ström, Ängelholm
200 kr
Ulla Luin, Tyresö,
1000 kr, (por EC)

*Memore al Nils-Erik
Kristoferson:*
Gurli Svensson,
Malmö, 100 kr
Börje Andersson,
Skövde, 500 kr

SEF kore dankas
pro la donacoj. No-
vaj donacoj estas
bonvenaj al
poŝtĝirkonto de
SEF 2012-3

LIBROJ

Eldona kaj la esperanto- konsumantoj

Ĉu ni ŝatas tion aŭ ne – iuj homoj lernas esperanton sen ideologiaj motivoj kaj rifuzas fariĝi membroj de ideorganizoj. Tiel ĉiam estis. Ni ĉiuj renkontis homojn, kiuj antaŭ jardekoj lernis esperanton, sed poste ĝin neniam uzadis. La Movado ofte eĉ ne sciis pri ilia ekzisto kaj en la Movado ili ne povis senti sin hejme. Komprenebla afero. La tiamaj cirkonstancoj malofte estis favoraj al vasta vojaĝado aŭ alia praktika uzado de esperanto.

Nun estas alie. Sufiĉas aĉeti la kazereton Pasporta Servo kaj oni jam estas ene en la komunumo. Aŭ eksiĝi ĉe la komputilo, skribi la vorton esperanto en serĉmotoro kaj frapi klaveton. Krome, novaj ekonomiaj kaj libertempaj cirkonstancoj malfermas antaŭe nekonatajn eblecojn.

Tiaj cirkonstancoj formas la novajn esperantistojn. Oni ne atendu, ke ili entuziasme kaftrinkadu en klubejoj aŭ ĉiujare kolektiĝu kongresante kun samnacionoj!

Kvankam kelkaj el ili certe estos ideo-esperantistoj, la komuna karakterizo estas, ke ili estos esperantokonsumantoj. Ili konsumos tiujn gran-

dajn avantaĝojn, kiujn prezentas esperanto en la internacia rilatado.

La senideologia esperantoorganizado Eldona Societo Esperanto devas servi ĝuste al ili. Unue ĝi devas atingi ilin per objektiva, senfanfara kaj sen-utopia informado. La plej multtekosta maniero realigi tion estas, ke en ĉiu publika biblioteko troviĝu bonkvalitaj libroj en kaj pri esperanto (vidu en La Espero 2001-1, paĝoj 11-12, kaj en La Espero 2001-2, paĝoj 10-11).

En la dua stadio ĝi devas provizi lernilojn por lernantoj kaj kursgvidantoj. Kaj en la tria stadio...

Nu, la leganto mem pripensu kaj komuniku siajn pensojn al la estraro de Eldona! Samtempe nin informu, ĉu vi volas en via komunumo esti nia "biblioteka reprezentanto", kies unua tasko estu inventarii la komunuman bibliotekon, por vidi, kiuj modernaj esperantolibroj jam troviĝas tie.

Skribu al Esperantoförlaget, kies adreson vi trovos sur paĝo du, aŭ al <m63sn3g7@students.su.se>

Bertil Nilsson

Kaoso en Budapeŝto

En 1982 aperis en la sveda *Kaoso i Budapest* de Nina Langlet. Nun aperis esperanta traduko de Kalle Kniivilä.

Valdemar Langlet estis kunfondinto de Klubo Esperantista en Uppsala, la dua esperanto-klubo en la mondo, kiu dum kelkaj jaroj eldonis la gazeton *Lingvo Internacia*. En 1906 li fariĝis la unua prezidanto de Sveda Esperanto-Federacio.

La libro tamen temas ne pri esperanto, sed pri tio ke Valdemar kaj Nina Langlet en Hungario dum 1944-45 savis la vivojn de miloj da judoj, kiam komenciĝis la deportado de judaj hungaroj al la neniigejoj de Hitler. La paro Langlet laboris por la Sveda Ruĝa Kruco, kiu eldonis protekt-dokumentojn, per kiuj multaj judoj povis saviĝi. La agado estis paralela al la agado de Raoul Wallenberg, kiu eldonis protekt-dokumentojn en la Sveda Legacio.

La libro, kiun verkis Nina Langlet, estas tre persona libro, kiu rakontas

pri renkontiĝoj kun homoj, pri senkompara krueleco, sed ankaŭ pri senkompara helpemo. La libro igas min pensi, ĉu mi kuraĝus aparteni al la kuraĝaj justuloj en tia situacio. La traduko de Kalle Kniivilä estas altkvalita. La esperantan eldonon kompletigas piednotoj verkitaj de István Ertl, kiu provizas la personan rakonton de Nina Langlet per abundaj historiaj faktoj. *Kaoso en Budapeŝto* estas leginda por tiuj kiuj volas lerni historion, por tiuj kiuj volas legi pli pri kiel homoj funkcias en malfacila situacio, kaj por ĉiuj, kiuj volas interesan libron.

*Nina Langlet;
Kaoso en Budapeŝto
Tradukis: Kalle Kniivilä
Serio Kargo/Bambu Ltd,
Varna 2001
168 p.*

Leif Nordenstorm

NEKROLOGOJ

Lennart Persson

Till minne av vår mångårige ordförande Lennart Persson, Leksand, död 12/2 2001. Hans kunnande och hjärtevarma sätt satte sin prägel på våra sammankomster, och han efterlämnar stor sorg och saknad bland oss esperantister i Dalarna.

Nils Erik Kristoferson

Södertäljegruppen har mist sin språk-vårdare. Redan vid gruppens tillblivelse lyckades Nils-Erik fånga en brokig skara till regelbundna träffar. Trots brokigheten kunde han leda alla framåt, var och en på sin nivå. En fri och lättsam stämning präglade hans sätt att driva kurs. Nils-Eriks försynta och ödmjuka framtoning gjorde att det behövdes några träffar innan man förstod vidden av hans kunnande. Han ville också visa oss på Esperantos många kvaliteter t.ex. ge oss i hemläxa att översätta serier, som ofta har en vitsighet i sig, tolkning av någon dikt samt avsluta varje träff med en sångövning till ackompanjering av en bandinspelning. Nils-Erik ville på detta sätt visa att Esperanto inte är ett dött språk utan ett i allra högsta grad levande och med all världens kultur inrymt i detta enda språk. Vi kommer att sakna Nils-Erik mycket men avser att hedra hans minne genom att också i fortsättningen driva träffarna i hans anda.

Södertäljegruppen

SEF perdis sian lertan, zorgeman revizoron Nils Erik Kristoferson.

Dum multaj jaroj mi kiel SEF-kasisto havis la ĝojon kunlabori kun li. Tre serioze li prenis la taskon esti SEF-revizoro kaj li volis havi ĉiun paperon kaj ciferon sub sia kontrolo. Longaj fariĝis la revizoraj tagoj, sed ili samtempe estis gajaj kaj agrablaj dank'al la bona humoro kaj ĝentileco de Nils Erik.

Arda estis lia intereso por la ekonomio de SEF kaj li oferis multe da laboro kaj energio por ĝi.

En la junaj jaroj li estis SEJU-prezidanto kaj ankaŭ pri tiu tempo mi havas agrablan kaj neniam forgesitan memoron pri li.

Börje Andersson
SEF-kasisto

Esperanto som metafor

Presstext och Mediearkivet är två källor man kan utnyttja om man vill läsa tidningsartiklar om esperanto. Presstext sträcker sig tillbaka till 1992 och omfattar artiklar från DN, Expressen, GT och tidningen Vi. Mediearkivet visar artiklar från 1994 och omfattar GöteborgsPosten, Borås Tidning, Helsingborgs Dagblad, Svenska Dagbladet, Arbetet, Nerikes Allehanda och Aftonbladet.

Jag har sökt enbart på ordet "esperanto" och fångat upp en hel del intressanta artiklar om esperanto, esperantister och esperantorörelsen. Men jag har också upptäckt att esperanto används som en populär metafor för att beskriva de mest säregna företeelser.

Här följer några citat från 1992 och fram till 2000.

"ett visuellt esperanto" DN 1992
 "ett slags intetsägande esperanto" DN 1992
 "esperanto-pengar" Expr 1992
 "umgås ombord med de adekvata, sjösäkra termerna, som ekar av havens urgamla esperanto" DN 1992
 "ett slags data-esperanto" Expr 1993
 "jazzens esperanto" DN 1993
 "religionernas esperanto" DN 1994
 "den kvinnliga infrastrukturens esperanto" DN 1994
 "valutornas esperanto" GP 1994
 "Ärligt talat tror jag inte på den unionen. Jag tycker det verkar som om esperanto för ekonomer." DN 1995
 "Vår tids esperanto - ett internationellt språk fullt av ord som stereo, satellit och salsa, behärskarna av vilket sällar agnarna från vetet." DN 1995
 "datakommunikationens esperanto" DN 1995
 "modets esperanto" DN 1995
 "utnämnde esperanton till proletarietets latin." SvD 1995
 "den nya esperanto-valutan" SvD 1995
 "Ibland är det svårt att inte uppfatta diktskrivandet som en sorts esperan-

to, som lever sitt eget liv över de nationella gränserna och fabricerar sina gemensamma yttre hot."

DN 1996
 "många agenter talar KQML, utvecklat av amerikanska försvaret. Kanske blir det agenternas esperanto. Ingen människa utom de som programmerar agenter ska behöva förstå KQML. Utåt mot människorna skall agenterna tala mänskligt språk."

DT3.0-96
 "Resten av året är det business as usual - alltså mer engelsk esperanto än nordiskt samspråkande."

GP 1996
 "de insåg att tekniken nog var mogen att skapa ett språk, som alla datorer förstod - ett digitalt esperanto."

GP 1996
 "informationsteknologin är på väg att bli världens esperanto. Det ger USA en ny komparativ fördel på den globala marknaden."

SvD 1996
 "Vi är nordens esperanto. Danskar och finnar förstår oss - bättre än varandra."

SvD 1996 (om Norges roll)
 "ett slags digital esperanto"

Expr 1997
 "språket är grammelot, den minimalistiska clown-esperanto, som är gångbar nästan överallt."

DN 1997
 "kroppsspråkets esperanto"

DN 1997
 "ett slags esperanto. Han tecknar utan förklarande text"

DN 1997
 "Kattliv i Tel Aviv. Skabbiga och skygga smyger de längs hus-väggarna. När man lockar dem med deras esperanto stirrar de skräck-slagna på en."

DN 1998
 "ett slags fornnordisk esperanto"

SvD 1998
 "ett teatralt esperanto, av kropp, gest, dans, mask och framför allt musik, som får tältet att pulsera av liv och vitalitet."

SvD 1998
 "Den nya tekniken och de många stilarna, det eklektiska blir känne-tecken för europeisk gemenskap, ett esperanto för arkitekturen."

SvD 1998
 "Det finns inget internationellt teckenspråk, inte något 'de dövas esperanto' utan varje land har sitt system."

N.A. 1998

"java är datorernas esperanto" Arb. 1999
 "skapa någon slags politisk esperantokultur" GP 1999

"författade på den politiska filosofins motsvarighet till esperanto."

SvD 1999
 "någon dansens esperanto finns ju inte - utom rent klassisk balett. Men det specifika kan även tala över alla gränser."

SvD 1999
 "latinets som de lärdes esperanto" Tidn. Vi 1999

"Internet är världens nya esperanto" GP 1999
 "- ett slags bildens esperanto, som skulle kunna kommunicera med människor på ett djupare plan än det illustrativa."

AB 2000
 "Med detta datorernas esperanto slipper man den klumpiga konstruktionen att varje språk översätts direkt från ett till ett annat"

AB 2000
 "Aronsson ställde sig frågan om huvudfotingen är ett slags esperanto."

BT 2000
 "han ger ton på klingande esperanto"

BT 2000
 "Det finns inget andligt esperanto"

Tidningen Dagen 2000
 "Matematik är naturens esperanto"

DN 2000
 "ingenting blir bättre av det hemmagjorda esperanto - urganska - som de gillar att sjunga på."

DN 2000
 "bildspråkets esperanto"

DN 2000
 "I denna tid är översättningslitteraturen viktigare än någonsin, den gör oss delaktiga i det specifika, det unika, medan informationsflödets esperanto leder i motsatt riktning."

GP 2000
 "Det mesta sjungs på latin och än en gång tackar man för detta ...sångens esperanto, som bygger broar mellan körer och sakral repertoar, som möjliggör att en baskisk och en svensk kör får träffas."

HD 2000

Inga Johansson

Esperanto just nu

Finns även som fristående blad som kan hämtas gratis från www.esperanto.se/justnu

@just nu

Aktuellt från esperantovärlden

Nr 1 · 17 december 2001

INTERNATIONELLA, NATIONELLA, LOKALA OCH PERSONLIGA NOTISER

"Esperanto just nu", detta blad, är ett experiment framväxt ur diskussionerna vid SEF:s senaste årskongress i Lesjöfors. Några nummer kommer att göras för att testa medlemmarnas intresse för ett sådant blad (A4, två sidor, ganska ofta). Det ska komplettera La Espero med korta och framför allt snabba notiser.

"Just nu" kommer att innehålla i första hand nyheter som sprids via internet; det riktar sig därför främst till medlemmarna som "bor i nätskuggan", dvs. saknar nätuppkoppling. Man ska kunna prenumerera på det för en avgift täckande pappers- och portokostnaden, men även hämta gratis på internet eller läsa på en dator på biblioteket. "Just nu" blir helt på svenska.

Notiser om lokala aktiviteter och annat som behöver få spridning kan skickas när som helst till justnu@esperanto.se, eller per post till Esperantoförbundet, Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm.

VECKOSLUTSKURS FÖR BERGSLAGENS FOLK

Bergslagens Esperanto-Förening inbjuder till en veckoslutskurs 11–13 januari 2002 på Esperanto-Gården i Lesjöfors. Ring Lennart Svensson, tel. 0590-309 09, för detaljinformation.

NY STYRELSEÖRDFÖRANDE I ESPERANTOFÖRLAGET

Bertil Nilsson har på egen begäran lämnat uppdraget som ordförande i Esperantoförlagets styrelse. Till ny ordförande valde styrelsen Ole Hansen.

Bertil Nilsson sitter kvar i styrelsen där han tänker prioritera arbetet med en serie läsa-lätt-böcker.

"GOOGLE" TALAR ESPERANTO

Den svenska sökmotorn Euroseek, den som kunde kommunicera på esperanto, verkar ha somnat in efter företagets konkurs (och skuld till SEF), men en ny och större sökmotor har lärt sig esperanto. Det är Google, www.google.com, en av de absolut största.

På den engelska startsidan kan man bland språken välja esperanto. Om man sparar detta val kommer i fortsättningen alla meddelanden att vara på esperanto (dock med cx-stavning). Google förstår även svenska, men från den svenska startsidan kan man ännu inte välja esperanto som alternativ.

LEIF NORDENSTORM NY REDAKTÖR FÖR "LA ESPERO"

Leif Nordenstorm, La Esperos ansvarige utgivare, har blivit utsedd till ny redaktör för La Espero. Leif har varit redaktör för tidningen tidigare, fram till 1993, då familjeskäl tvingade honom att lämna över redaktörskapet.

Leif Nordenstorm är kyrkoherde i Boden och esperantist sedan 1974.

ÄVEN TIDNINGEN "ESPERANTO" FÅR NY REDAKTÖR

Även UEA:s tidning "Esperanto" får ny redaktör fr.o.m. januari 2001. Han heter Stano Marček och kommer från Slovakien. Tidigare var han redaktör för Slovaka Esperantisto och just nu redigerar han Heroldo de Esperanto. Hans utnämning är för ett år.

"ZABAN-E-SALAM/LINGVO DE PACO"

Esperantisterna i Iran lanserar en kampanj för att hjälpa flyktingar från krigsdrabbade Afghanistan, av vilka mer än 4 miljoner bor i Iran.

Under namnet "Zaban-e-Salam/Lingvo de Paco" (Fredens språk) vill de lära esperanto till läskunniga afghaner. I kampanjen ingår fler punkter, bl. a. humanitär hjälp till behövande och ett program att lära läsa och skriva för de afghaner som inte fått utbildning. La Espero återkommer med fler detaljer om kampanjen i ett kommande nummer.


NÄSTAN VÄSTAFRIKANSK ESPERANTO-KONGRESS I TOGO

Under jul och nyår kommer esperantisterna i Togo att anordna sin 9-e esperantokongress. Deltagarna väntas, förutom det egna landet, också från Benin, Nigeria, Ghana och flera europeiska länder. Mera information från Agnes Geelen, Oude Donklaan, 20, BE-2100 Deurne, Belgien, agnes@esperanto.be.

PEKING ELLER VILNIUS EFTER GÖTEBORG?

UEA:s styrelse har börjat diskutera med två kandidatstäder som vill anordna världskongressen 2004. Det är Litauens huvudstad Vilnius och Kinas huvudstad Beijing. UEA:s avgående direktör Osmo Buller har besökt båda städerna och återkommit med lika positiva rapporter, vilket inte lär göra styrelsens val särskilt enkelt.

Sten Svenonius
Vendelsfridsgr 4C
21764 Malmö



Esperantoförbundet, Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm

letero de la estraro

Problemojn oni devas solvi

Sonis tiel bone en pli frua numero de *La Espero*, ke ĝi aperis ĝustatempe. Kaj poste okazis ĉi tiu senprecedenca (?) malfruiĝo, kiu **ne** dependas de la redaktoro Jan Setréus. Nu, fine la gazeto aperas kaj ĝis la fino de la jaro aperos pli de ĝi.

La estraro sukcesis ankaŭ trovi novan redaktoron por *La Espero*. Tio estos Leif Nordenstorm, jam antaŭe redaktoro, kiu reprenos tiun funkcion pli frue ol intencite. Li estas plene okupita en sia laboro (pastro en Boden) kaj familio (kvin infanoj), finpreparo de doktora disertacio — ĉu io pli? Vi do komprenas, ke li bezonos helpo de ni ĉiuj por bone funkcii. La estraro kore dankas lin, ke li surpronis la tre respondecan taskon.

Tio estis nur unu el la problemoj, kiujn la estraro devas trakti ĉijare. En la buĝeto por 2001 ni kalkulis pri 20 000 kronoj de Euroseek pro liveritaj servoj. Tiu firmao bankrotis kaj la mono neniam atingos nin. 20 000 kronoj estas terure signifa sumo por SEF.

Bone helpas nin la donacoj de la membroj; pluraj reagis al la letero sendita pli frue ĉi jare kaj proponanta membrecon en **Rondo Langlet**, laŭ kiu oni aranĝas monatan transpagon de libervola sumo. La kasisto Börje Andersson, tel. 0500-41 22 05, volonte helpos vin kun la formalajoj, nur unufojaj, se tiu formo subteni la laboron de SEF taŭgas por vi.

Sed montriĝis, ke multaj preferas donaci unuopajn sumojn, eĉ se pli altaj.

Unu estrarano demandis sin, ĉu ekzistas membroj, familioj aŭ kluboj, kiuj pretus fariĝi "**dommastro de Esperanto-Centro**", la oficejo de SEF, por unu monato. Kiel dommastro oni havas la respondecon pagi la luon de difinita monato, ne zorgi pri ĝia funkciado.

Mallonga priesploro montris, ke almenaŭ tri tuj montris intereson. La demando nun estas, ĉu ekzistas pli ol tiuj tri. Oni povos elekti la monaton, por kiu oni volos esti dommastro (ĉiuj 12 estas momente liberaj, ĉar ĝis nun okazis nur antaŭesploro), eventuale por honori specialan datrevenon — eble sian esperantigon aŭ fondodaton de klubo? En la estraro ni ne ankoraŭ findiskutis la detalojn de tiu aranĝo, sed se vi pretus "mastiĝi" telefonu al Franko Luin (08-712 82 91 vespere, 08-742 83 36 tage) aŭ Roland Lindblom (tel. 08-777 41 75).

Kiel "dommastro" oni liberigas SEF de la bezono pagi la lukoston de Esperanto-Centro. Tio disponigus kvanton da mono, kiun ni povus uzi por aliaj celoj: aranĝo de seminarioj, kiuj helpus al disvastigo de esperanto, aŭ partopreno en ekspozicioj, ekzemple Skolforum. Ĉu ne taŭga sekvo de "dommastiĝo"?

ENGELSKA PÅ TILLBAKAGÅNG PÅ INTERNET

Engelska språket dominans på internet blir allt mindre. I början av oktober var den nere i 43%. Man beräknar att den hamnar på ca 35% år 2005. Antalet icke-engelska nätanvändare ökar snabbt, från 49% i oktober 2000 till 55% i juli 2001. Aktuell statistik kan man se på <http://glreach.com/globstats/>.

KOLLA OM DU FORTFARANDE ÄR MED PÅ LISTAN

Telenordia har förstärkt vissa rutiner för eposthanteringen i sina servrar, dvs även för Algonet, där SEF har sin sajt. P.g.a. det har distributionen av artiklar från Esperantonytt slutat fungera (liksom för NUN). Nu har koden i programmet som sköter distributionen ändrats enligt de nya kraven, så att det ska fungera igen. Om du vill se om det är något viktigt som du gått miste om, kolla på www.esperanto.se/ enytt eller www.esperanto.se/nun.

Det är också möjligt att några epost-adresser till prenumeranter på Esperantonytt blivit raderade. Varför det skett vet vi inte. Om du vet att du är med på svesp-l-listan eller prenumerant på Esperantonytt, men inte fått något på länge, kan du registrera dig som prenumerant på nytt på samma sida. Det kostar, liksom tidigare, ingenting.

GRATIS EFTERSÄNDNING FRÅN @ESPERANTO.SE-ADRESS GÄLLER FORTFARANDE

Som *La Espero* meddelat tidigare kan alla medlemmar i SEF få en @esperanto.se-adress. Kraven är att man har betalt medlemsavgift till SEF och att man har en fungerande e-postadress till vilken eposten eftersänds. Varje medlem i en esperanto-familj kan på detta sätt ha en egen adress, även om familjen i övrigt har en gemensam elektronisk brevlåda.

Mera information och anmälningsblankett finns på www.esperanto.se/epost/.

BEHÖVS "ESPERANTO JUST NU"?

Tycker du att SEF behöver ett litet blad som snabbt kan komma med meddelanden om vad som händer med esperanto i landet och i världen? Skriv till justnu@esperanto.se och tyck till!